

**DIA REGNO**

ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

\* dumonata kristana revuo en esperanto \* n-ro 1 (862) \* 2007 \*



Bibliaj libroj  
Apokrifoj

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el  
diversaj landoj kaj per Esperanto  
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021;  
✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4,  
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;  
☎ +31 1724 20222;  
✉ e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,  
DE 74074 Heilbronn, Germanio;  
☎ +49 7131 162688;  
✉ SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume  
€20,- \* Membro-subtenanto €30,- \* Nura abono:  
pagante rekte al KELI €16,- \* pagante al Libroservo  
€18,- \* Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita  
letero al la kasisto de KELI. \* Se estas en via lando  
UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu  
prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI \*  
Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Storgatan 6 A; S 153 30 Järna; Svedio;  
☎ +46 (70) 2004574;  
✉ dr\_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ  
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la  
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke  
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ  
traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel Polnický; Na Vinici 110/10

✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;  
☎ +420 325 615 651;  
✉ Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

## ENHAVO

Novjara saluto	3
Infanojn oni daŭre ekspluatas	4
Ĝojkrio pro bela afero	5
Biblio, biblioj, kanonoj kaj dua- kanonaj libroj...	6
aŭ: kial mi ektradukis ilin?	
Pri la kanonaj kaj duakanonaj libroj en la ortodoksia eklezio	8
Luteranoj pri duakanonaj libroj	9
2 (4) Ezra – La eklezio kiel nova Izrael	10
Ezra redonas la biblion	15
La vortoj de Jesuo Kristo sur la kruco - parto unu	18
Esperantistoj en la evangelia eklezio en Togolando	21
Nekrologo Elsbeth Walder- Guggenbühl	23
Gracon deziri	24

## REDAKTORAJ VORTOJ

Rapide flugas la tempo. Jam la duan  
jaron mi komencas kiel redaktoro. Estas  
interesa kaj gajiga tasko. Mi denove  
volas danki ĉiujn kiuj sendas al mi  
kontribuojn. Kelkfoje mi ne povas  
enmeti ĉion kaj kelkfoje nur post iom da  
tempo. Mi tamen ŝatus ricevi ankaŭ  
kontribuojn de multaj aliaj kiuj kutime  
ne sendas al mi. Mi ŝatus ke Dia Regno  
estu bunta kaj varia. Certe ankaŭ vi ŝatus.

Ĉi-numere vi trovos artikolojn pri la  
duakanonaj libroj. Pro la nova eldono  
de la Esp.-Biblio mi mem interesigis pri  
tiuj libroj, kiujn mi ĝis nun ne legis.

Sekvont-numere mi esperas ke mi  
povos enmeti multajn artikol(et)ojn pri  
amo, la temo de nia ekumena ĉi-jara  
kongreso. Ĉu vi sendos ion mallongan,  
ekz. rezencon, poemon, artikolon aŭ ion  
alian? Alimaniere ne eblos.

# Novjara saluto de nia prezidanto

Philippe COUSSON, FR

**K**araj gefratoj en Kristo, nia komunumo estas stranga komunumo. Kiel ĉiuj kristanaj komunumoj, ni dividas la fidon en Kristo, nia Sinjoro kaj Savanto, sed ĉar ni estas el diversaj konfesioj kaj landoj, ni kunigas multajn facetojn de kristanismo. Ni ne troviĝas ĉiusemajne por Diservo, eĉ nur por kelkaj ni renkontiĝas dum unu semajno somere, en iu lando eble fora. Tiam ĉi ni vivas eĉ pli ol komuna kristana komunumo. Niaj ceteraj dumjaraj kontaktoj estas aŭ poŝtaj, aŭ retaj, sed ankaŭ grave revuaj. Tia estas nia komunumo.

Krome, ĉiu el ni apartenas al loka kristana komunumo, eklezio aŭ paroĥo. Ni partoprenas en diversaj agadoj, asocioj, movadoj, kristanaj aŭ ekster-kristanaj. Nia kristaneco manifestiĝas ankaŭ ekster esperantismo. Ne nur inter la gesamideanoj ni atestas pri nia fido, almenaŭ mi esperas.

Sed, nune, ni pli kaj pli malmultnombriĝas en la kongresoj de KELI. Nia partopreno en ekumenaj kongresoj pli kaj pli reduktiĝas preskaŭ al simbolo. La abonantaro de la revuo ankaŭ malpliĝas. Kaj ankaŭ la estraranoj daŭre maljuniĝas kaj aspiras al renovigo.

Jen al alvoko. Post preskaŭ jarcento de vivo (en 2011), KELI ŝajnas kiel velkanta flamo. Kiamaniere revigliĝi tiun ĉi flamon? KELI vivis en la diversaj epokoj de projektoj, kiuj portis ĝin. En la komenco, kuniĝo de esperantistaj



kristanoj kaj atestado al la esperantistoj, eldono de la Biblio (1926). Post la milito, ekestis la kongresoj (1948) por interkonatiĝo en la resaniĝanta Eŭropo, poste eldono de kant-libroj (1971 ADORU KANTANTE, 2001 ADORU), ankaŭ ekumenismo (de 1968). Ŝajne nun, kiam Eŭropo kuniĝas, liberaliĝas, la kristana esperantismo diseriĝas. Ĉu simple indikilo de la stato de kristanismo en niaj socioj? Mi dubas, kvankam... La alvoko, do: ni bezonas projektojn por porti nin antaŭen, ni bezonas estraranojn por kungvidi kaj porti tiujn projektojn.

Kiujn projektojn? Krom la necesa, laŭ mi, daŭrigo de la kongresoj (nura maniero kunveni kaj konatiĝi), troviĝas inter la eblecoj ekzemple partopreno en la monda vivo de la elektronika reto, ankaŭ (eble sammove) partopreno de esperantaj aŭtoroj en la teologia vivo.

Se do, vi deziras porti en novan elanon nian ligon KELI, vi povas proponi eblan estraron, proponi projekton. Mi atendadas la sugestojn.

Tiu nova jaro estu al ni per la Sankta Spirito, kiu kiel ni kredas kondukas la Eklezion, nova komenco.

Nia Dio benu vin ĉiujn persone, familio kaj komunume en via loĝloko, kaj ankaŭ per nia internacia kristana komunumo. ☺

# Infanojn oni daŭre ekspluatas por militaj celoj

Jaques TUINDER, NL

**A**ntaŭ kelke da jaroj mi kun teamo misiis en Srilanko. Dum tiu psike peza kaj korpe laciga periodo ni laboris tutan tagon en sufiĉe bone ekipita rekapabligejo por eksaj infansoldatoj. La oftaj rakontoj, kiujn la gejunuloj konfidis al ni, estis ege teruraj, nekomprenible malhumanaj! Tiutempe en mi vivis la espero, ke rilate al Srilanko tiu fiafero absolute ne plu ripetigos.

La realeco bedaŭrinde estas kontraŭa. Malgraŭ denovaj kaj denovaj alvokoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN) ankoraŭ ĉiam estas multe da landoj, kiuj enarmeigas infansoldatojn kiuj riskas sian komenĉantan vivon en armile solvotaj konfliktoj. Ankaŭ grupiĝoj de ribeluloj ofte ekspluatas junaĝajn soldatojn. Laŭ raporto de internacia organizaĵo por defendo de homaj rajtoj HRW, pensanta pri severaj sankcioj, temus pri minimume 300.000 infanoj!

Ekde la jaro 2002 UN plurfoje raportis pri infansoldatoj, gejunuloj sub la aĝo de 18 jaroj kiuj – devige aŭ nedevige – devas militservi. Kelke da landoj kaj multe da grupiĝoj de ribeluloj grave kaj obstine malobeas al internaciaj militetikaj normoj.

Al ili apartenas la Tamilaj Tigroj de Srilanko, Maoistoj en Nepalo, rezista armeo de Ugando, grupiĝoj en Kongolando, Kolombio kaj la Filipinoj.

“Ĉi tiuj grupiĝoj ripetfoje kaj senhonte spitis la Konsilantaron pri Sekureco, enarmeigante infanojn kiel soldatoj”, laŭ Jo Becker, HRW-advokato

defendanta infanrajtojn. “UN devus mobilizi ĉiujn siajn fortojn por puni ĉiujn grupiĝojn, kiuj detruas la vivojn de vundeblaj infanoj.”

Infanojn oni konsideras facile manipuleblaj soldatoj; ili estas obeemaj, juĝnekapablaj kaj ofte neniel konscias pri minacanta morto. Ili ne postulas dikan salajron kaj scipovas elstare uzadi aŭtomatajn armilojn.

Precipe en Afrikaj landoj infansoldatojn oni amase kaptaĉas por solvi konfliktojn, flanke kaj de naciaj superuloj kaj de ribelularo. En Kongolando deĵoras neplenaĝuloj soldatserve en la nacia armeo, sed ankaŭ ribeluloj ilin grandskale ekspluatas.

La regiono ĉirkaŭ la grandaj lagoj en Afriko, al kiu apartenas la orienta parto de Kongolando, havas fifaman reputacion pro la multaj infansoldatoj. En Burundio ribeluloj soldatigas infanojn. En la najbara Ugando devige prenitaj kaj eĉ kaŝrabitaj infanoj jam dudek jarojn severe kaj kruele soldatas! Temus en Ugando dum tiu periodo pri 20.000 infanoj... La fino de ĉi tiu konflikto, tiel oni esperas, ŝajnas proksima.

Kiom da infanoj perdis la vivon? Neniu scias. Kiom da infanoj neretroveble malaperis? Ankaŭ tion neniu scias.

Kiam finfine tiu senkonsciencia misuzado de junaj knabinoj kaj knaboj definitive apartenos al la pasinteco, kaj hontige troviĝos sur la plej nigraj paĝoj de la homa historio? ☞

# Ĝojkrio pro bela afero

Mu Binghua, Ĉinio

**A**ntaŭ ne longe mia parenco venis de vilaĝa fruktoĝardeno al mia hejmo kaj alportis al mi unu korbon da bonkvalitaj pomoj. Mi tuj invitis miajn kelkajn kolegojn al gustumado de tiuj pomoj dolĉaj kaj sukriĉaj. Estis feliĉe, ke la invitatoj akurate alvenis kun pluraj infanoj.

Mi elprenis unu pomon el la korbo kaj ĝin metis sur mia mano. Mi komencis demandi iun el la infanoj: “Ĉu vi volas la pomon?” Post iom da penso, nee skuinte la kapon, li foriris de mi senvorte.

Mi do demandis alian infanon: “Ĉu vi volas manĝi la pomon?” Li efektive ne emis, sed murmuris tra la dentoj: “Mi prenos nur duonan pomon, se vi lasas min manĝi.”

Mi plu demandis la trian infanon: “Ĉu vi volas la pomon?” Kun malkonsento sur la tuta vizaĝo, li respondis tiel: “Ĉu la pomo certe estas bongusta frukto?”

Mi nur povis min turni al la kvara infano per la sama demando. Li ekrigardis la pomon kaj tuj poste ĝojkriis: “Ha! Kiel bela ruĝa pomo!” En tiu momento mi sentis en mia koro, ke tiu infano vere estas la plej aminda el ĉiuj etaj gastoj.

Nun mi ekmemoris ankaŭ unu raporton, kiun lastatempe mi legis en nia ĵurnalo. Ĝi raportis, ke estis somera kampado, en kiu partoprenis dek rusaj infanoj kaj dek ĉinaj. Laŭdire, tiuj dek ĉinaj estis elektitaj el pli ol mil infanoj, do ili ĉiuj sendube estis tre talentaj.

Tamen en la raporto ĵurnalisto skribis: “Kompare kun la rusaj infanoj la ĉinaj infanoj havis gravajn mankojn. Ekzemple, ili estis malpli lertaj en konkurso de flugpilko; al ili mankis kuraĝo kiam okazis montgrimpado; ili en kantado kaj dancado ne pli bele prezentis sin ol la samaĝaj infanoj el Rusio.”

Sed min ne multe interesis la supre menciitaj faktoj. Mi ekstreme rimarkis nur tion, ke niaj talentaj infanoj eĉ ne povsciis “ĝojkriojn”! Laŭ la raporto, kiam en amuza vespero la ĉinaj infanoj prezentas siajn programerojn, la rusaj infanoj laŭte ĝojkrias, manaplaŭdante varme. Kontraste, spite al tre brilaj programeroj prezentataj de la rusaj infanoj, la ĉinaj infanoj rigardis la spektaklon kun indiferentaj okuloj. Nur sub la gvido de instruisto ili vole malvole donis aplaŭdadon, evidente etiketan.

Ĉu pro ruĝa pomo aŭ pro elstara programero eligi ĝojkrion el la interna koro devas esti denaska natureco de infanoj? Ĉiuj homoj senescepte ŝatas kaj amas belajn aferojn, ĉu ne?

Hodiaŭ tiaj ĝojkrioj inter plenkreskuloj jam maloftiĝas pli kaj pli, sed kial ankaŭ eĉ niaj infanoj rifuzas pro belaj ĝojkrii. Mi firme kredas, ke tiuj, kiuj povas ĝojkrii pro belaj aferoj, certe povas sentime ankaŭ kritiki malbelajojn en nia socio. Mi volas voki al ĉiuj infanoj: Bonvolu ĝojkrii pro ĉiu ajn bela afero! ☺



# Biblio, biblioj, kanonoj kaj duakanonaj libroj... aŭ: kial mi ektradukis ilin?

Gerrit BERVELING, NL

**P**or protestantantoj estas tradicie, havi hejme ekzempleron de la Biblio. Oftege estis familia kutimo, ĉiutage legi parton el ĝi, ofte kune ĉe la manĝo.

Tio – almenaŭ en Nederlando – dum mia junaĝo estis unu el la plej grandaj diferencoj inter katolikoj kaj protestantoj: katolikoj eĉ ne havis Biblion, protestantoj legis en ĝi.

Mi estis edukita en tre tradicia romkatolika familio, sed multaj el miaj parencoj estis protestantoj: do ambaŭ flankojn delonge mi konas.

En la antaŭlasta klaso de l' gimnazio mi ricevis de la gepatroj ekzempleron de la romkatolika Biblio; ĝi ja ekzistis naci-lingve, sed ho – kiu legus tian libreĝon?

Kiu?

Ja mi!

Rezulte mi forlasis la romkatolikan eklezion, kelkajn jarojn poste. Kaj de post 1984 mi estas protestanta pastoro.

La Biblion ni kristanoj ricevis de la Juda popolo. Tie ekestis la plej unua formo de l' Biblio: pli malpli en la 5a jc a.Kr. la Torao havis sian nunan amplek-son, estis kanonigita. Tio estas la libroj, kiujn ni konas kiel Genezo ĝis inkluzive Readmonon. Por la malgranda religia komunumo de la ankoraŭ ekzistantaj Sa-marianoj tiu Torao estas la Biblio. Tamen, al ĝi inter la Juda popolo aldoniĝis (kompreneble en la Hebrea lingvo) iom post iom ankaŭ la libroj de

la diversaj grandaj kaj malgrandaj profe-toj (Amos, Obadja, Jesaja, Jeremia ktp) kaj pluraj aliaj verkaĵoj (Psalmoj, Alta Kanto, Sentencoj ktp). Kaj la Juda popolo uzadis ilin ĉiujn sen fiksi klarajn limojn, kio jes kaj kio ne apartenus al la tiel nomataj “sanktaj skriboj”. Ili ĉiuj ja estis sur skribrulaĵoj, kaj kiam el unu oni volis legi, oni simple elprenis tiun rulaĵon el la ŝranko.

Multaj Judoj delonge ne plu loĝis en la origina regiono, kiun la Romianoj pli poste nomis Palestino; de post la 5a jc a.Kr. multaj Judoj loĝis ie ajn en Mez-Oriento kaj en Egiptio. Precipe tie, en la nova metropolo Aleksandrio, fondita en 330 a.Kr., loĝis kaj laboris multaj Judoj. Tie ekestis la unua traduko de bibliaj libroj: oni nomas tiun tradukon en la Grekan la Septuaginto – la Judoj ĝin faris por la granda internacia biblioteko de Aleksandrio, la plej granda studocentro de la klasika mondo. Kaj ankaŭ ĉar mul-taj tieaj Judoj tute ne plu komprenis la originan Hebrean lingvaĵon.

La Judoj en Aleksandrio tamen ne nur tradukis el la Hebrea, sed ankaŭ mem verkis novajn librojn – en la Greka, ĉar la “moderna internacia mondo” de Alek-sandrio ja estis Greklingva. La Grekan – parenteze – oni uzadis pli malpli mil jarojn tra la tuta orienta parto de l' Med-iteraneo, ĝis profunde en Irakon. Ankaŭ la Romianoj estis devigitaj en tiuj re-gionoj uzadi la Grekan; nur okcidente ili povis uzi sian propran Latinan.

Pro la agado de Jesuo el Nazaret, kaj pliposte de liaj apostoloj, estiĝis kristanismo. Ties apostoloj kaj aliaj misiistoj disvastigis la novan religion, kaj ĉe tio ili uzadis la Biblion por substreki sian mesaĝon per trafaj citoj. Kaj tute aŭtomate ili uzadis la Grekan Biblion el Aleksandrio, ĉar en tiu lingvo ili estis larĝe kaj vaste komprenataj. Do por la kristanoj, la unua Biblio estis la Septuaginto. Kompreneble relative baldaŭ por ili aldoniĝis al tio la Nova Testamento.

Reage al la estiĝinta “herezo” de kristanismo, la ortodoksa Judismo fiksas la kanonon de sia Biblio: nur la pure Hebreaj libroj estis akceptitaj en ĝi.

Kristanismo disvastiĝis ĉiam pli. Oni ektradukis la Biblion en novajn lingvojn; ni menciuj nur pri la fama Latina traduko de Hieronimo, la Vulgato, kiu dumlonge fariĝis la oficiala Biblio por la okcidenta Eklezio. La orienta Ortodoksia Eklezio kompreneble retenis la tradician Septuaginton plus la aldonita Novan Testamenton: tio estas ankoraŭ ĉiam ilia oficiala Biblio.

La okcidenta kristanismo en la epoko de l’ Reformacio displitiĝis en romkatalikan eklezion ĉirkaŭ Romo (kun la Vulgato kiel oficiala Biblio) kaj plurajn protestantajn ekleziojn kun nacilingvaj tradukoj de la Biblio. Ekzemple Lutero tradukis la kompletan Biblion en la Germanan – pli poste estiĝis traduko en la Francan, en la Nederlandan ktp por Kalvinanoj. Angla traduko jam aperis.

Kalvino tamen forte substrekis, ke la Malnovan Testamenton ni kristanoj heredis de la Judoj: kaj ĉar tiuj nur havis la

Hebrean Biblion, nur tiujn librojn la Kalvinanoj rekonis kiel verajn librojn de Malnova Testamento. Reage la romkatalika eklezio en sia Tridentina Koncilio ne nur kondamnis la grandajn Reformaciajn gvidantojn, sed ankaŭ emfaze (re)kanonigis la tutan Malnovan Testamenton laŭ la kanono de l’ Vulgato.

Rezulte de tio ni do povas konstati, ke nuntempe en la mondo ekzistas:

- A) la plej malampleksa Biblio ĉe la Samarianoj: nur la Torao;
- B) pli ampleksa Biblio ĉe la Judoj: la Hebra Biblio (TeNaĤ);
- C) pli ampleksa Biblio ĉe la Kalvinana tradicio: la Hebreaj libroj + NT (la origina Londona Esperanto-Biblio);
- D) pli ampleksa Biblio ĉe la eklezio de Romo: la Hebreaj libroj + duakanonaj libroj + NT (la nuna Esperanto-Biblio);
- E) ankoraŭ iomete pli ampleksa Biblio ĉe la orientaj Ortodoksiaj Greka kaj Rusa eklezioj: pri tradukado de la libroj, kiuj nur tie ankaŭ apartenas al la Biblio, mi nuntempe okupiĝas.

Ĉar en mia persona vivo siatempe la legado de la Biblio tiel grave efikis, por mi ĝi estas ege grava verko. Ankaŭ kulture la Biblio grandege formis nian Eŭropan civilizon: ne eblas vere kompreni nian pentrarton kaj nian literaturon Eŭropan tra la jarcentoj sen koni la Biblion – kaj la Grekan-Roman heredaĵon, oni ne forgesu!

Kaj tial laŭ mi estas gravege, ke ankaŭ en Esperanto ekzistu – kaj estu legata! – la kompleta Biblia tradicio. Ne nur la plej centraj verkoj el tiu tekstaro multe influis, sed eĉ la malplej centraj. ∞

# Pri la kanonaj kaj duakanonaj libroj en la ortodoksia eklezio

Larisa KUZMENKO, RU

Jen mi sendas al Vi la artikolon pri la kanonaj kaj duakanonaj libroj, kiun parte mi tradukis el la aldonaĵo de la Pravoslava (Ortodoksia) rusa Biblio. En nia Eklezio ni ne konsideras apokrifajojn kiel sanktaj libroj, kaj mi nenion trovis kaj tradukis pri ili. Mi esperas ke la informo taŭgos por la revuo.

**L**a Kristana Biblio konsistas el du partoj: la Malnova kaj la Nova Testamento (MT, NT). La libroj de la MT estis skribitaj dum pli ol mil jaroj antaŭ Kristnasko en la malnov-hebrea lingvo, la libroj de la NT estis skribitaj en la greka lingvo je la unua jarcento (j.c). En la MT estas libroj kanonaj kaj duakanonaj. La ĉefa diferenco inter ili estas en tio ke la kanonaj libroj estas pli malnovaj, skribitaj en la XV--V-a j.c-oj antaŭ Kristnasko (a.Kr), sed la duakanonaj libroj t.e. la libroj, kiuj ne eniris en la kanonon (aron de la sanktaj libroj) estis skribitaj pli malfrue – en la IV-a--I-a j.c-oj a.Kr. La MT-on oni skribis poiome. La unua kolektanto de la sanktaj libroj estis Ezra (la V-a j.c a.Kr). En la II-a j.c a.Kr. -- I-a j.c p.Kr. la MT estis la sama kiel ekzistas nun en la moderna hebrea masora Biblio (ĝi havas nur la MT-on; la masoristoj gardis historion, finis la skribon en la VIII-a j.c a.Kr). Tie estas 39 libroj. Post la tempo kiam hebreoj revenis el la Babela malliberejo, t.e. post la V-a j.c antaŭ Kristnasko, estis skribitaj ankorau kelkaj libroj en hebrea kaj greka

lingvoj. Ili jam ne estis inter la kanonaj hebreaj sanktaj libroj, sed ili estis utilaj libroj de la greka traduko de la Biblio kun la Apokrifajoj atribuitaj al 72 tradukintoj en la III-II j.c-oj a.Kr. (=Septuaginto).

La Bibliaj libroj en Latina lingvo estis konataj jam fine de la dua j.c p.Kr. La beata Jeronimo tradukis ilin denove fine de la IV-komence de la V-a j.c-oj, kaj la tradukon oni konas kiel Vulgato, kiu estas uzata en la Katolika Eklezio.

La traduko de la sanktaj libroj en la slavan (malnovrusan) lingvon estis farita de la sanktuloj Cirilo kaj Metodo en la IX-a j.c-o. La nuntempa slava Biblio estas reeldono de la eldono de la carino Jelizaveta de la jaroj 1751-1756, kiam la teksto de la MT estis kontrolita laŭ la greka Biblio.

En la rusan lingvon la Biblio estis tradukita meze de la XIX-a j.c. La kanonaj libroj estis tradukitaj el la hebrea masora teksto kun la aldonoj kaj variantoj el Septuaginto kaj la duakanonaj – el la greka, krom la tria libro de Ezro, kiu estis tradukita el la Latina lingvo, ĉar la libro estas nek en la hebrea nek en la greka Biblio. La rusa



pravoslava (ortodoksia) Biblio havas 39 kanonajn kaj 11 duakanonajn librojn de la MT.

Jen estas la kanonaj libroj: Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmono, Josuo, Juĝistoj, Rut, I Reĝoj, II Reĝoj, III Reĝoj, IV Reĝoj (en Esp. Biblio estas Samueloj), I Kroniko, II Kroniko, I Ezra, Neĥemija, Ester, Ijob, Psalmoj, Sentencoj, Predikanto, Alta kanto, Jesaja, Jeremia, Plorkantoj, Jeĥezkel, Daniel, Hoŝea, Joel, Amos, Obadja, Jona, Miĥa, Naĥum, Ĥabakuk, Cefanja,

Hagaj, Zeharja, Malaĥi. Jen estas duakanonaj libroj: II Ezra, Tobit, Judit, Saĝeco, Sirahido, Letero de Jeremia, Baruh, I Makabeoj, II Makabeoj, III Makabeoj, III Ezra.

La divido de la Biblio je ĉapitroj okazis en la XIII jc kaj estis farita de la kardinalo Stefan Langton kaj dominikano Hugo de Sen-Shira.

La divido de ĉapitroj je versoj okazis meze de la XVI-jc fare de la Pariza tipografo Robertus Stefanus. ∞

---

## Luteranoj pri duakanonaj libroj

Leif NORDENSTORM, SE

**G**errit Berveling bone priskribas la historion de la biblia kanono ĉi-apude. Aldone mi volas iom priskribi la luteranan sintenon. Laŭ ofte citata frazo Marteno Luther opiniis ke la duakanonaj libroj estis "bona kaj utila legaĵo" sed tamen ne veraj bibliaj libroj. La duakanonaj libroj tamen estis parto de la germana traduko de Luther kaj ankaŭ de aliaj tradukoj en landoj kun luterana plimulto, kiel ekzemple en Svedio. Citaĵoj el ekzemple Sirahido vivas kiel proverboj en la sveda. Tio montras ke la duakanonaj libroj vere estis legataj dum longa tempo.

En la komenciĝo de la 19a jarcento britaj bibliaj societoj komencis vendi malmultekostajn bibliojn en la sveda lingvo. Ĉar al la societoj apartenis kaj anglikanoj kaj kalvinanoj, oni forigis la

duakanonajn librojn por kontentigi la kalvinanojn. Dum la sama jarcento lernejoj fariĝis devigaj kaj pro tio la sveda popolo ĝenerale komencis scii legi. Do, la unuaj biblioj, kiuj estis havigeblaj al la sveda plejmulto estis sen la duakanonaj libroj. Pro tio ekestis kredo ke la duakanonaj libroj ne apartenas al la Biblio. Nur en la jaro 2000 aperis nova sveda traduko en kiu de nove troviĝas la duakanonaj libroj.

La situacio en multaj aliaj luteranaj eklezioj ŝajnas esti simila: la duakanonaj libroj nun revenas post jarcentoj da forgeso.

Por mi persone la duakanonaj libroj estas ege valoraj, kvankam mi rapide povas konstati ke en mia Biblio estas malpli da substrekitaj frazoj en la duakanonaj libroj ol en aliaj. ∞

## 2 (4) Ezra

### La eklezio kiel nova Izrael – ĉapitroj 1 kaj 2

Gerrit BERVELING, NL

**E**stas iom problemece, kiel indiki la diversajn *Ezra*-librojn. En la Hebrea Biblio, oni konas la librojn *Ezra* kaj *Nehemja*. Tiujn ankaŭ en la Esperanto-Biblio oni nomas tiel. En la *Septuaginto* (aŭ LXX, la malnova Greka traduko) oni nomas ilin kune *Esdras b* aŭ *2 Ezra*. En la *Vulgato* (la Latina traduko) ili estas konataj kiel *1 Esdras* kaj *2 Esdras*, alidire: *1 Ezra* kaj *2 Ezra*. Ambaŭ ĉi tiuj libroj origine estis verkitaj en la Hebrea lingvo, kvankam en la Hebrea *Ezra* enestas fragmentoj en la Aramea lingvo.

Apud tiuj ĉi libroj, kiuj estas kanonaj en la Juda Biblio, same kiel en la Biblio de ĉiuj kristanaj eklezioj, ekzistas ankoraŭ kelkaj aliaj libroj *Ezra*: en la *Septuaginto* ekzistas krome la libro *Ezra a* aŭ *1 Ezra*. En la *Vulgato*, ĉu por simpligi, ĉi sama verko nomiĝas *3 Ezra*. Por ankoraŭ pli komplikigi la aferon, ekzistas krom tio en la *Vulgato* la libro *4 Ezra*.

Pri ambaŭ ĉi lastaj verkoj ni atentu la jenon: *3 Ezra* origine estis verkita supozeble en la Greka, kvankam pluraj fakuloj insistas pri tio, ke ĝi devas esti traduko el ne plu ekzistanta originalo ĉu Hebrea ĉu Aramea. *4 Ezra* origine estis verkita verŝajne en la Hebrea; supozeble tra Greka traduko ĝi estis tradukita en la Latinan; el la frua kristanismo restas al ni krom la Latina, ankaŭ tradukoj en pluraj aliaj lingvoj. Kelkfoje, citante el *The Cambridge Bible Commentary* aŭ el *The New Oxford Annotated Bible with the Apocrypha*, en piednoto pri tio ni atentigas. Kvankam ambaŭ ĉi tiuj *Ezra*-libroj ja enestas en la manuskripta tradicio de l' *Vulgato*, *3 + 4 Ezra* ne estas konsiderataj kiel kanonaj en la okcidenta eklezio; sed *3 Ezra*, sub la indiko *1 Ezra*, ja estas kanona en la Greka Ortodoksio, dum *4 Ezra* estas kanona en la Rusa Ortodoksio.

La verko *4 Ezra*, efektive, konsistas el tri malsamaj libretoj. Fakuloj foje uzas la indikon *4 Ezra* por ĉapitroj 3-14; *5 Ezra* por ĉapitroj 1-2; kaj *6 Ezra* por ĉapitroj 15-16.

#### *Ezra vokita kiel profeto*

1:1 Libro de la profeto Ezra, filo de Seraja, filo de Azarja, filo de Ĥilkija, filo de Ŝalum, filo de Cadok, filo de Aĥitub, 2 filo de Aĥia, filo de Pineĥas, filo de Eli, filo de Amarja, filo de Azija, filo de Marimot, filo de Arna, filo de Uzi, filo de Borit, filo de Abišua, filo de Pineĥas, filo de Eleazar, 3 filo de Aaron, el la tribo de Levi, kiu estis kaptito en la

lando de la Medoj, en la regno de Artahâst, la reĝo de la Persoj.

4 Venis la parolo de la Sinjoro al mi, dirante: 5 Iru, sciigu al Mia popolo iliajn malbonagojn kaj la maljustaĵojn de iliaj idoj, kiujn ili kulpas kontraŭ Mi, tiel ke ili sciigu al la infanoj de siaj infanoj, 6 ke la pekoj de iliaj patroj kreskis ĉe ili; forgesante pri Mi, ili ja donis oferojn al fremdaj Dioj. 7 Ĉu ne Mi elkondukis ilin

el la lando Egipta, el la domo de sklav-eco? Sed ili kolerigis Min kaj malŝatis Miajn konsilojn. 8 Sed vi, elŝiru harojn de via kapo, kaj elŝutu ĉiun malbonon super ilin, ĉar ili ne obeis Mian leĝon; estas ja popolo sendisciplina. 9 Kiel longe Mi ilin eltenos – ilin, al kiuj tiom da bono Mi faris? 10 Multajn reĝojn pro ili Mi renversis: Faraonon kun ties filoj kaj lian tutan armeon Mi batis; 11 ĉiujn naciojn Mi neniigis antaŭ ili, kaj en oriento Mi dispelis la popolon de du provincoj, Tiro kaj Cidon, kaj ĉiujn iliajn kontraŭulojn Mi mortigis.

*Izrael malobeis kaj estos malakceptita*


12 Sed vi, parolu al ili kaj diru: Jen diras la Sinjoro: 13 Nepre nur Mi trairigis vin tra la maron, kaj sekurajn ebenaĵojn Mi montris al vi en la dezerto; gvidanton Mi donis al vi: Moseon, kaj Aaronon, la pastron. 14 Lumon Mi donacis al vi per fajra kolumno, kaj grandajn mirindaĵojn Mi plenumis ĉe vi. Sed vi forgesis Min, diras la Sinjoro.

15 Jen diras la ĉiopova Sinjoro: La koturnoj estis signo por vi, tendumejoj Mi donis por ŝirmi vin, sed tie vi plendadis. 16 Vi ne triumfis je Mia nomo, neniigante viajn malamikojn, sed vi ĉiam ankoraŭ grumbladas. 17 Kie restis la bonfaroj, kiujn Mi montris al vi? Ĉu en la dezerto, malsatante kaj soifante, vi ne alvokis Min, 18 dirante: Kial Vi kondukis nin en ĉi tiun dezerton, por mortigi nin? Estus pli bone por ni, resti sklavoj en Egiptujo ol morti en ĉi tiu dezerto! 19 Sed Mi kompatis pri via ĝemado kaj donis manaon al vi por manĝi: panon de anĝeloj vi manĝis. 20 Ĉu Mi ne fendis rokon, kiam vi soifis: kaj jen fluis akvo

ĝis satigo! Pro la brula varmo Mi kovris vin per arabaj folioj. 21 Mi disdonis inter vi riĉajn landojn: Kanaanidojn, Perizidojn, kaj Filiŝtojn Mi forpelis de antaŭ via vizaĝo. Kion Mi ankoraŭ do faru? diras la Sinjoro.

22 Jen diras la ĉiopova Sinjoro: Kiam en la dezerto vi estis ĉe la amara rivero, kaj vi blasfemis Mian nomon, 23 Mi ne sendis al vi pro viaj blasfemoj la fajron, sed ĵetante lignon en la akvon, Mi faris ĝin dolĉa. 24 Kion Mi faru, ho Jakob? Vi ne volis aŭskulti Min, Jehuda. Mi transiros al aliaj popoloj kaj donos Mian nomon al ili, por ke ili gardu Miajn ordonojn. 25 Ĉar vi forlasis Min, ankaŭ Mi forlasos vin; kiam vi priploros de Mi pardonon, Mi ne kompatos pri vi. 26 Kiam vi alvokos Min, Mi ne elaŭdos vin. Ĉar vi malpurigis viajn manojn per sango, kaj viaj piedoj estas senlacaj por

"Ezra in Prayer" by Gustave Doré



Doré Bible Illustrations - Free to Copy  
[www.creationism.org/images/](http://www.creationism.org/images/)  
 Ezr 9:6 And said, O my God, I am rebuked and blush to lift up my face to thee, my God: for our iniquities are increased over our head, and our trespass is grown up unto the heavens.

plenumi murdojn. 27 Estas kvazaŭ vi forlasis ne Min, sed vin mem, diras la Sinjoro.

### *La zorgoj de Dio pri Izrael*

28 Jen diras la ĉiopova Sinjoro: Ĉu Mi ne petegis vin, kiel patro siajn filojn, kiel patrino siajn filinojn, kaj kiel nutristino siajn infanetojn, 29 ke vi estu por Mi Mia popolo, vi Miaj infanoj – kaj Mi via patro? 30 Mi kunigis vin sub Miajn flugilojn, kiel kokino siajn idetojn. Sed nun, kion Mi faru pri vi? Mi forpelos vin de antaŭ Mia vizaĝo. 31 Kiam oferojn vi alportos al Mi, Mian vizaĝon Mi forturnos de vi; ĉar viajn festojn, monatkomencojn kaj cirkumcidojn en la karno Mi repudias. 32 Miajn servantojn, la profetojn, Mi sendis al vi, sed vi kaptis kaj mortigis ilin, kaj iliajn korpojn vi disŝiris: Mi repostulos de vi ilian sangon, diras la Sinjoro.

### *La venonta popolo*

33 Jen diras la ĉiopova Sinjoro: Via domo estos dezerta, kaj vin mem Mi disblovos, kiel la vento la pajlon. 34 Viaj filoj ne havos idaron, ĉar kune kun vi ili ne atentis Miajn ordonojn, kaj faris kio estas malbona antaŭ Mi. 35 Viajn loĝejojn Mi transdonos al popolo venon-



ta; kiuj, ne aŭdante Min, kredos; al kiuj signojn Mi ne donis, sed tamen ili faros, kion Mi ordonis. 36 Profetojn ili ne vidis, sed ili rememoros kion instruis <la profetoj> en tempoj antikvaj. 37 Mi atestas pri la graco de tiu venonta popolo. Iliaj etuloj jubilos kun ĝojo; kvankam ili ne vidos Min per korpaj okuloj, tamen en la spirito ili kredos Miajn dirojn. 38 Kaj nun, patro<sup>1</sup>, rigardu fiere, kaj vidu la popolon venanta de oriento. 39 Al ili Mi donos kiel gvidantojn Abrahamon, Izaakon, kaj Jakobon, kaj Hoŝean, Amoson, Miĥan, Joelon, Obadjan, Jonan, 40 Naĥumon, Ĥabakukon, Cefanjan, Ĥagajon, Zeharjan, kaj Malaĥion, kiu ankaŭ nomiĝas sendito de la Sinjoro.

### *Juĝo de Dio pri Izrael*

2: 1 Jen diras la Sinjoro: Ĉi tiun popolon Mi elkondukis el la sklaveco; ordonojn Mi donis al ili per Miaj servantoj, la profetoj, sed ili ne volis aŭskulti kaj vanigis miajn konsilojn. 2 La patrino, kiu naskis ilin, diras: Iru, miaj infanoj, ĉar vidvino mi estas kaj forlasita. 3 Mi edukis vin kun ĝojo, sed mi perdis vin en funebro kaj tristeco, ĉar vi pekis antaŭ la Sinjoro Dio, kaj vi faris malbonon antaŭ mi. 4 Sed nun, kion mi faru por vi? Ĉar vidvino mi estas kaj forlasita. Iru, infanoj, kaj petu pardonon de la Sinjoro. 5 Sed vin, patro, Mi alvokas por aldoni vian ateston al la ŝia pri ŝiaj infanoj, ke ili ne volis servi al Mia interligo, 6 tiel ke vi konfuzu ilin: prirabiĝu ilia patrino, kaj idaron ili ne havu. 7 Ili dispeliĝu inter la nacioj, iliaj nomoj malaperu de la tero, ĉar Mian interligon ili malŝatis.

8 Ve al vi, Asirio, ĉar la maljustulojn

vi tenas kaŝitaj ĉe vi! Ho malbona popolo, memoru, kion Mi faris al Sodom kaj Gomora, 9 kies lando kuŝas en peĉo-geboj kaj cindramasoj. Same Mi faros al tiuj, kiuj ne aŭskultos Min, diras la ĉiopova Sinjoro.

*La privilegioj de Izrael donitaj al la eklezio*  
10 Jen diras la Sinjoro al Ezra: Heroldu al Mia popolo, ke Mi donos al ili la regionon de Jerusalem, kiun unue Mi prezentis al Izrael. 11 Mi eĉ reprenos al Mi Mian gloran ĉeeston, kaj al <la novaj> Mi donos la eternajn loĝejojn, kiujn <origine> Mi preparis por <Izrael><sup>2</sup>. 12 La arbo de la vivo donos al ili bon-

---

**Patrino, brakumu viajn infanojn, eduku ilin en ĝojo kiel la kolombo, firmigu iliajn paŝojn, ĉar vin Mi elektis, diras la Sinjoro.**


---

odoran unĝventon, kaj ili ne bezonos klopodi nek laciĝi. 13 Iru, kaj vi ricevos, tial preĝu, ke via mallonga tempo fariĝu ankoraŭ malpli longa: jam pretas por vi la regno: vigilu! 14 Ateste alvoku, alvoku ĉielon kaj teron: Mi forigis la malbonon kaj kreis la bonon, ĉar Mi estas la vivanta, diras la Sinjoro.

*Konsiloj al la eklezio*

15 Patrino\*, brakumu viajn infanojn, eduku ilin en ĝojo kiel la kolombo, firmigu iliajn paŝojn, ĉar vin Mi elektis, diras la Sinjoro. 16 La mortintojn Mi starigos de iliaj lokoj, kaj el iliaj tomboj Mi elkondukos ilin, ĉar Mian nomon Mi rekonas en ili. 17 Ne timu, patrino de

idaro, ĉar Mi elektis vin, diras la Sinjoro. 18 Mi sendos al vi por helpi Miajn servistojn Jesaja kaj Jeremia, laŭ kies konsiloj Mi sanktigis kaj preparis por vi dek du arbojn, pezajn de diversaj fruktoj; 19 kaj same mult-



tajn fontojn, kiuj fluas je lakto kaj mielo, kaj sep grandegajn montojn, sur kiuj kreskas rozoj kaj lilioj, per kiuj viajn infanojn Mi plenis je ĝojo.

20 Juste traktu la vidvinon, defendu la orfon, donu al la povrulo, vestu la nudan, 21 prizorgu la vunditan kaj malfortan, ne primoku la lamulon, ŝirmu la kriplan, kaj alvenigu la blindan por vidi Mian lum-brilon. 22 Protektu la oldulon kaj la junulon inter viaj muroj. 23 Kie mortintojn vi trovos, entombigu ilin kaj metu signon super ili, kaj Mi donos al vi unuaecon ĉe la resurekto. 24 Estu kvieta kaj ripozu, Mia popolo, ĉar venos via ripozo. 25 Nutru viajn infanojn kiel bona nutristino, firmigu iliajn piedojn. 26 Neniu el la servantoj, kiujn Mi donis al vi, pereos, ĉar Mi repostulos ilin el via nombro. 27 Ne estu zorgoplenaj, ĉar kiam venos la tago de premateco kaj zorgoj, ploros aliaj kaj <ili> estos tristaj, sed vi estos gaja kaj ĝojos abundecon. 28 La nacioj ĵaluzos, sed povos nenion kontraŭ vi, diras la Sinjoro. 29 Miaj manoj vin ŝirmos, por ke viaj idoj ne vidu Gehenon. 30 Estu ĝoja, patrino, kune kun viaj infanoj<sup>3</sup>, ĉar Mi vin savos,

diras la Sinjoro. 31 Memoru viajn dormantajn infanojn, ĉar tiujn Mi elkondukos el la kaŝitejoj de la tero, kaj Mi montros kompatemon al ili, ĉar kompatema Mi estas, diras la ĉiopova Sinjoro. 32 Brakumu viajn infanetojn ĝis Mi venos, kaj sciigu kompaton al ili, ĉar tre akvoriĉaj estas Miaj fontoj, kaj Mia graco ne mankos.

### *La premio de la regno*

33 Mi, Ezra, ricevis ordonon de la Sinjoro sur la monto Horeb, ke mi iru al Izrael. Kiam mi venis al ili, ili malakceptis min, kaj malŝatis la ordonon de la Sinjoro. 34 Tial mi diras al vi, ho nacioj kiuj aŭdas kaj komprenas: Atendu vian paŝtiston: eternan ripozon li donos al vi, ĉar tiu, kiu venos je la fino de la epoko, estas proksima. 35 Estu preparitaj por la premio de la regno, ĉar eterna lumo lumos super vi por eterne. 36 Fuĝu la ombro de ĉi tiu epoko, kaj ricevu la

---

**Kaj tiam la anĝelo diris al mi:  
Iru, kaj heroldu al mia popolo,  
kiajn miraklojn de Dio vi vidis,  
kaj kiom.**

---

ĝojon de via gloro. Publike mi atestas pri mia Savanto. 37 Akceptu lin, kiun indikis la Sinjoro, kaj estu ĝojaj, dankante al Li, kiu vin vokis al la ĉiela regno. 38 Leviĝu, ekstaru, kaj vidu kiom estas signitaj por la manĝo de la Sinjoro. 39 Kiuj foriris el la ombro de ĉi mondo, ricevis lum-brilajn tunikojn de la Sinjoro. 40 Akceptu, Cion, vian plenan nombron, kaj fermu la liston de la

blanke-vestitoj, kiuj fidele plenumis la leĝon de la Sinjoro. 41 Plena nun estas la nombro de viaj filoj, kiujn vi tiom sopiris, Preĝu pri la Regno de la Sinjoro, por ke sanktiĝu via popolo, kiu estis vokita de-komence.

### *Vizio de Ezra*

42 Mi, Ezra, vidis sur monto Cion grandan amason, kiun mi ne povis nombri, kaj ĉiuj laŭdis la Sinjoron per himnoj. 43 Kaj meze de ili troviĝis junulo de impona alteco, pli alta ol ili ĉiuj, kaj sur ĉiujn iliajn kapojn li metis kronojn, unuope, sed li estis pli alta ol ĉiuj. Kaj mi estis mirigita. 44 Tiam mi pridemandis la anĝelon, kaj diris: Kiuj estas ili, sinjoro? 45 Kaj li respondis al mi: Tiuj estas, kiuj demetis sian morteman tunikon kaj sin vestis per la senmorta, kaj konfesis la nomon de Dio; nun ili estas kronataj, kaj ricevas palmbranĉojn. 46 Kaj mi diris al la anĝelo: Kiu estas tiu junulo, kiu surmetas al ili la kronojn, kaj kiu donas la palmbranĉojn en iliajn manojn? 47 Responde li diris al mi: Tiu estas la filo de Dio, kiun en ĉi mondo ili konfesis. Mi komencis laŭdegi ilin, kiuj rezistis tiel kuraĝe pro la nomo de la Sinjoro. 48 Kaj tiam la anĝelo diris al mi: Iru, kaj heroldu al mia popolo, kiajn miraklojn de Dio vi vidis, kaj kiom.

80

[1] Tekstvariaĵo: frato. La alparolato devas esti Ezra. Dio kvazaŭ donas al li la titolon 'patro de la popolo'. Vidu ankaŭ en 2:5.

[2] La latina teksto diras: por ili. Aliaj malnovaj versioj ĉi tie havas: por Izrael.

[3] En la morto.

# Ezra redonas la biblion

## La reskribado de la sanktaj Skriboj: 14:1-47

Gerrit BERVELING, NL

**F**oje mi aŭdis, ke devas ekzisti iu pia legendo, ke siatempe post la tempo de l' ekzilo Ezra estis la persono, kiu reorganizis Judismon eĉ tiugrade, ke nur dank' al lia agado oni denove ricevis la Hebreajn librojn de la Biblio.

Longe mi pensis, ke tio estas nura pia legendo - sed multe da legendoj ja havas minimume ie siajn bazon kaj kialojn...

Kiel ajn, dum mia traduklaboro mi renkontis tekston en 2 (4) Ezra, el kiu antaŭ nelonge pecon mi sendis al vi, por ilustru ankaŭ tiun ĉi rakonton: jen:

*Ezra devas prepariĝi por sia vivofino*

**14** 1 Kaj la trian tagon, dum mi sidis sub kverko, 2 voĉo eliris al mi el rubuso, dirante: Ezra, Ezra.

Mi diris: Jen mi, Sinjoro. Kaj mi ekstaris.

Li diris: 3 Mi malkaŝis Min en rubuso, kaj parolis al Moseo, dum Mia popolo estis sklavo en Egiptujo. 4 Mi sendis lin, kaj elkondukis Mian popolon el Egiptujo. Mi kondukis lin sur la monton Sinaj, kaj tenis lin ĉe Mi multajn tagojn. 5 Mi rakontis al li multajn mirindaĵojn, kaj montris al li la sekretojn de la tempoj kaj la finon de la tempoj. Kaj Mi donis al li la ordonon: 6 Ĉi tion vi diskonigu senkaŝe, kaj tion ĉi vi tenu sekreta. 7 Nun Mi diras al vi: 8 La signojn, kiujn Mi montris, kaj la sonĝojn, kiujn vi vidis, kaj la interpretojn,

kiujn vi aŭdis, tenu tiujn en via koro. 9 Ĉar vi estos forprenita de la homoj, kaj estonte vi loĝos apud Mia filo kaj viaj similuloj, ĝis finiĝos la tempo, 10 ĉar ĉi mondo perdis sian junecon kaj la tempoj komencas maljuniĝi. 11 La tempo ja estas dividita en dek du erojn, kaj naŭ[1] el tiuj eroj jam pasis kaj duono de la deka; 12 do restas ankoraŭ du, krom duono de la deka. 13 Nun vi do ordigu vian domon, avertu vian popolon, konsolu tiujn, kiuj tion bezonas, kaj retiriĝu de l' homa vivo. 14 Demetu de vi la mortemajn pensojn, deskuu la homajn ŝarĝojn, senigu vin de l' malforta naturo; kuŝigu unuflanken la ideojn, kiuj vin ĝenas, kaj haste formigru el ĉi tiu mondo. 15 Ĉar katastrofoj, pli gravaj ol kiujn vi nun vidis okazi, estas okazontaj: 16 ĉar dum ĉi mondo fariĝas pli senforta pro sia aĝo, des pli kreskos la katastrofoj

al ĝiaj loĝantoj. 17 La vero iros ĉiam pli foren, kaj la malvero pli alproksimiĝos. La aglo, kiun en la vizio vi vidis, jam estas alfluganta.

### *Ezra havas zorgojn pro la malapero de la Skriboj*

18 Mi diris: Lasu min paroli[2] antaŭ Vi, Sinjoro. 19 Mi ja foriros, kiel Vi ordonis al mi, kaj mi avertos mian popolon nun vivantan. Sed kiuj poste naskiĝos: kiu avertos ilin? 20 La mondo ja estas en obskuro, kaj kiuj loĝas en ĝi ne havas lumon, 21 ĉar Via leĝo estas forbruligita, kaj tiel neniu plu scias, kion Vi faris kaj kio okazos. 22 Se mi ja trovis gracon antaŭ Vi, metu do sanktan spiriton en min; tiam mi skribos ĉion, kio okazis en la mondo de la komenco, ĉion, kio estis skribita en Via leĝo, por ke la homoj


povu retrovi la padon, kaj ke tiuj, kiuj volas vivi en la lastaj tagoj, tion faru.

23 Responde Li diris al mi: Iru, kunvoku vian popolon, kaj diru al ili, ke kvardek tagojn ili ne serĉu vin. 24 Sed vi mem, vi preparu al vi multajn tabelojn, kunvenigu kun vi Sarean, Dabrian, Selemian, Etanon kaj Asielon, kvin virojn kapablajn skribi rapide. 25 Tiam vi venu ĉi tien, kaj en via koro Mi briligos la lampon de l' kompreno, kiu ne estiĝiĝos antaŭ ol ĉio pretos, kion vi komencos skribi. 26 Kaj kiam vi estos preta, kelkajn <aferojn> vi faros publikaj, kaj kelkajn vi transdonos kaŝe al saĝuloj. Morgaŭ ĉi-hore vi komencu skribi.

### *La lastaj paroloj de Ezra al sia popolo*

27 Mi foriris, kiel Li ordonis, kaj mi kunvenigis la tutan popolon kaj diris: 28 Aŭdu, Izrael, ĉi tiujn parolojn: 29 Pilgrime migris niaj gepatroj dekomence en Egiptujo, kaj ili estas liberigitaj de tie. 30 Ili ricevis leĝon de la vivo, sed ili ne obeis ĝin; ankaŭ vi – post ili – malobeis ĝin. 31 Kaj lote vi ricevis landon en la tero de Cion, sed vi kaj viaj gepatroj faris maljuston kaj ne gardis la vojojn, kiujn al vi ordonis la Plejaltulo. 32 Kaj ĉar Li estas justa juĝisto, je la momento Li forprenis de vi, kion Li donis. 33 Kaj nun vi estas ĉi tie <en ekzilo>, kaj viaj gefratoj eĉ pli fore. 34 Sed se vi regos vian menson kaj instruos vian koron, vi restos vivaj, kaj post la morto vi ricevos indulgon. 35 Ĉar juĝo venos post la morto, kiam denove ni estos vivigitaj; tiam la nomoj de l' justuloj manifestiĝos kaj la agoj de

"Ezra Reading the Law in the Hearing of the People" by Gustave Doré



Doré Bible Illustrations • Free to Copy  
[www.creationism.org/images/](http://www.creationism.org/images/) Neh 8:5-6 And Ezra opened the book in the sight of all the people; ... And Ezra blessed the Lord, the great God. And all the people answered, Amen, Amen, ...



la malpiaj estos montrataj. 36 Sed nun neni veni al mi, kaj neni serĉu min dum kvardek tagoj.

*La reskribado de la sanktaj Skriboj*  
37 Kaj mi kunvenigis la kvin virojn, kiel Li ordonis al mi, kaj ni foriris al la kampo, kaj tie ni restis. 38 La morgaŭan tagon jen voĉo min vokis dirante: Ezra, malfermu vian buŝon kaj trinku, kion Mi donas al vi trinki. 39 Mi malfermis la buŝon, kaj jen kaliko tute plena estis prezentata al mi. Ĝi estis plena je io kvazaŭ akvo, sed ĝia koloro similis je fajro. 40 Mi akceptis kaj trinkis, kaj dum mi trinkis, mia koro elverŝiĝis je saĝeco kaj profunda scio kreskis en mia brusto. Ĉar mia spirito retenis sian memoron, 41 kaj mia buŝo estis malfermita kaj ne plu fermita.

42 La Plejaltulo donis saĝecon ankaŭ al la kvin viroj, kaj laŭvice ili skribis ĉion, kio estis dirita, per signoj, kiujn ili

ne konis. Ili sidis tie kvardek tagojn. Dumtage ili skribadis, 43 sed nokte ili manĝis panon; mi parolis dumtage kaj ankaŭ nokte mi ne silentis. 44 Tiel en kvardek tagoj estis skribitaj naudek kvar libroj.

45 Kaj kiam pleniĝis la kvardek tagoj, la Plejaltulo parolis: Kion[3] ĝis nun vi skribis, faru tion publika: legu ĝin la homoj, kiuj estas indaj je ĝi, kaj kiuj ne. 46 Sed la sepdek laste skribitajn librojn vi konservu, por transdoni ilin al la saĝuloj inter via popolo. 47 Ĉar en ili estas fluo de kompreno, fonto de saĝeco kaj rivero de profunda scio. Kaj tiel mi do faris. ✠

[1] Variaĵo: dek.

[2] La Latina diras: Mi parolis. Aliaj manuskriptoj: Lasu min paroli.

[3] La Siriaka traduko diras: La naŭdek kvar librojn, kiujn vi skribis.

## La regno de Dio

### Sankta Luko 9

60 Sed li diris al li: Lasu la mortintojn enteriĝi siajn mortintojn; sed vi iru kaj proklamu la regnon de Dio.

61 Kaj ankoraŭ alia diris: Mi vin sekvas, Sinjoro; sed unue permesu al mi adiaŭi tiujn, kiuj estas en mia domo. 62 Sed Jesuo diris al li: Neniu, metinte sian manon al la plugilo kaj rigardante malantaŭen, taŭgas por la regno de Dio.

# La vortoj de Jesuo Kristo sur la kruco

La kvar unuaj deklaroj – parto unu

pastoro Bayo AFOLARANMI

Ĉi tiu estas la studo de LA VORTOJ DE JESUO KRISTO SUR LA KRUCO – la signifoj kaj aplikoj por ni nuntempe. La kleruloj pri la Sankta Biblio ne konsentas pri la sinsekva aranĝo de ĉi tiuj deklaroj, tamen, ni sekvu unu el la eblaj aranĝoj.

## Unua Deklaro

*“Kaj Jesuo diris: Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras”* (Luk 23:34).

Ĉi tiu deklaro estas la plenumo de la profetaĵo en Jes 53:12, *“Tial Mi donos al li multajn kiel lian parton, kaj la potenculojn li dividos kiel akiron; pro tio, ke li elmetis sian animon al la morto kaj estis alkalkulita al krimuloj, dum li portis sur si la pekon de multaj KAJ PETIS POR LA KRIMULOJ.”* Jesuo Kristo diris ĉi tiun preĝon por tiuj kiuj estis kulpaj pri Lia mortigo. Ĉu Li aludis la “Judojn” aŭ “la Romajn soldatojn” aŭ ambaŭ ilin, oni ne povas diri. Efektive, la Romaj soldatoj ne sciis tion kion ili faris; por ili, ili nur obeis la ordonon de siaj estroj. Tamen, la Judoj sciis ke Li estas senkulpa. Ili konspiris kontraŭ Li el ĵaluzo ke Li asertis esti la promesita Mesio. Tamen, se ili sciis ke Li estas la Mesio, kaj ke Li finfine leviĝos de la mortintoj je la tria tago kiel Li antaŭdiris, ili ne krucumus Lin. Paŭlo atestis ĉi tion en 1 Kor 2:8, *“Kaj kiun scias neniu el la regantoj de ĉi tiu mondo; ĉar se ili ĝin sciis, ili ne krucumus la Sinjoron de gloro.”* Tio signifas ke nek la Romaj soldatoj kiuj ekzekutis Lin nek

la Judoj kiuj instigis la ekzekuton reale sciis tion kion ili faris – tial la deklaro.

La deklaro havas multajn aplikojn por ni nuntempe. Jesuo Kristo montris sian instruon ke ni devas preĝi por niaj malamikoj, eĉ dum ili penas vundi nin (Mat 5:43-48; Luk 6:27-36). Paŭlo kaj Petro ankaŭ konfirmis ĉi tion en Rom 12:17-21 kaj 1 Pet 3:9. Ĉi tio distingas Kristanisman de ĉiuj aliaj religioj, ĉar neniu alia religio instruas al homoj preĝi por la pardono al malamikoj. Homoj de la mondo trovas venĝon, sed la kristano eltenas riproĉon kaj persekutojn per pacienco, kaj preĝas ke Dio pardonu tiujn kiuj vundas ilin, kaj savu ilin de iliaj pekoj. Stefano sekvis ĉi tiun instruon kiam li preĝis por tiuj kiuj ŝtonmortigis lin (Ago 7:60).

Ĉu vi povas preĝi por viaj malamikoj, precipe tiuj pri kiuj estas evidente ke ili penas vundi vin? Ĉu vi scias ke ili plenumas la celon de Dio en via vivo? Preĝu por viaj malamikoj ĉar ili ne scias tion kion ili faras.

## Dua Deklaro

*“Kaj Li diris al li: Vere mi diras al vi: Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo”* (Luk 23:43).

Ĉi tiu deklaro estas respondo al peto farita de unu el la du krimuloj kiuj estis krucumitaj kun Jesuo. La alia krimulo insultis Jesuon Kriston kiel faris la amaso. Tamen, ĉi tiu riproĉis lin ĉar li sciis ke ili (la krimuloj) estis punitaj juste,

sed Jesuo Kristo estis senkulpa. Tiam, li faris la peton, “*Jesuo, memoru min, kiam vi venos en vian regnon*” (Luk 23:42). La peto sugestis ke li sciis kiu Jesuo Kristo estas, kaj li kredis je Li. Kvankam, oni ne scias kiam li unue renkontis Jesuon Kriston kaj kiam li pentis, sed li uzis la lastan oportunon kiun li havis peti la favoron de Dio en Lia regno.

La respondo de Jesuo Kristo signifas ke Li sciis kien Li estis ironta, kaj ke Li havas la povon preni aliajn homojn tien. Li deklaris ke je tiu tago la krimulo estos kun Li en Paradizo – la ripoza loko de escepta beno, feliĉo, kaj ĝojo kie la animoj de la justuloj estas ricevitaj ĝis la releviĝo de ilia korpo.

Unu el la aplikoj de ĉi tiu deklaro estas ke eĉ dum Jesuo travivis suferon, Li ankoraŭ savis aliajn. Cirkonstancoj ne devas malhelpi nin por helpi tiujn ĉe nia atingo kiuj ankoraŭ estas pli bonaj. Alia apliko estas ke la plej grandaj pekuloj povas akiri pardonon kaj favoron de Dio kiam ili venas al Li kun pentanta koro. Plue, estas neniam tro malfrue por penti, sed ni devas ne atendi ĝis la lasta minuto por fari tiele ĉar neniu scias sian lastan minuton kaj ni eble ne havos tian oportunon de pento kiel tiu petanta krimulo. Estas pli bone serĉi la vizaĝon de Dio nun! “*Ĉar Li diris: En tempo de favoro Mi aŭskultis vin, Kaj en tago de savo Mi helpis vin; JEN NUN LA TEMPO DE FAVORO; JEN NUN LA TAGO DE SAVO*” (2 Kor 6:2).

Alia apliko de ĉi tiu deklaro estas ke morto ne estas la fino de homo. La animo ekzistas aparte de la korpo tuj post morto. La animoj de la justuloj estos faritaj feliĉaj. Ili sentos ke ili estas sekuraj; ili estos akceptitaj inter la justulojn; kaj ili

havos la certigon de glora senmorteco. Tiu stato estos malsimila ol la stato de la malvirtuloj. La parabolo de la riĉulo kaj Lazaro en Luk 16:19-31 ilustras ĉi tion.

Kie vi estos post morto? Ĉu vi estos kun Jesuo Kristo en Paradizo aŭ kun la Diablo en infero?

## **Tria Deklaro**

*“Jesuo, rigardante Sian patrinon, kaj la apudstarantan disĉiplon, kiun Li amis, diris al Sia patrino: Virino, jen via filo! Tiam Li diris al la disĉiplo: Jen via patrino!”* (Joh 19: 26-27).

La virinoj kiuj jam estis kun Jesuo Kristo ekde la tempo kiam Li estis en Galileo staris ĉe la kruco. Inter ili estis Lia patrino. Kiam Li vidis ŝin kaj la disĉiplon kiun Li amis, Li faris ĉi tiun deklaron, “*Virino, jen via filo! ...Jen via patrino!*” La deklaro estas esprimo de prizorgo por la patrino, eĉ sur la kruco. La fakto ke Jesuo aludis sian patrinon kiel “virino” kaj ne “patrino” jam igis kelkajn

“The Crucifixion” by Gustave Doré



el Liaj kritikantoj akuzi Lin pri malhonoro al sia patrino. Tamen, la esprimo estis kutima je Lia epoko kaj oni neniam rigardis ĝin kiel signon de malhonoro. Lia respekto por sia patrino igis Lin transdoni ŝin al unu el siaj fidindaj disĉiploj por deca zorgo. Li volis ke ŝi vidu la disĉiplon kiel sian filon kaj la disĉiplo vidu ŝin kiel sian patrinon, kaj tial prizorgu ŝin. La disĉiplo komprenis Lin kaj tuj prenis ŝin en sian propran domon.

La apliko de ĉi tiu deklaro estas ke infanoj devas prizorgi siajn gepatrojn, eĉ kiam estas malfacile por ili fari tiele. Jesuo Kristo jam antaŭe kondamnis la agon de malzorgo de oniaj gepatroj dum oni servas Dion (vidu: Mat 15:4-6; Mar 7:10-13). La kvina leĝo jam ordonis devigon al gepatroj kiel religian devigon (Eli 20:12; Rea 5:16). Por infano ne prizorgi siajn gepatrojn precipe dum ili estas maljunaj estas peko.

Jesuo Kristo prizorgis sian patrinon je Sia mortanta tempo. Ĉu vi prizorgas viajn gepatrojn? Ĉu ili povas preĝi por vi kaj beni vin je siaj mortantaj tempoj pro via prizorgo?

## **Kvara Deklaro**

*“Kaj ĉirkaŭ la naŭa horo Jesuo ekkriis per laŭta voĉo, dirante: Eli, Eli, lama sabahtani? tio estas: Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis min?”* (Mat 27:46).

Je la punkto dum la doloro estis neeltenebla por Jesuo Kristo sur la kruco, Li faris ĉi tiun deklaron. Ĝi estas la plenumo de Psa 22:1. Ŝajnis al Jesuo Kristo ke Dio jam forlasis Lin tie. Efektive, Dio ja lasis la malamikojn de Jesuo Kristo (la Judojn) kaj Satanon plenumi ilian volon kaŭzi tian severan doloron sur Jesuo.

Estis profetita en Gen 3:15 ke la serpento (Satano) pikados la kalkanon de la idaro de la virino (t. e. Jesuo Kristo). Satano uzis la oportunon forte.

Estas notinde ke kvankam Jesuo Kristo pensis ke Dio jam forlasis Lin, Li ne neis Dion. Li ankoraŭ aludis Lin kiel “Mia Dio.” Li sciis ke ĝi estis por iu celo – efektiviĝi la laboron de nia eterna savo (Rom 5:6, 8; Heb 2:14-15; 5:9; 10:5-10).

Kian situacion vi trapasas? Ĉu vi preĝis kaj Dio ne respondis al viaj preĝoj? Ĉu ŝajnas kvazaŭ Dio jam forlasis vin? Ĉu homoj ĉirkaŭ vi mokas vin pro via malfacilaĵo? Nu, DIO NE FORLASIS VIN! Legu ĉi tion: “

*Sed Cion diris: La Eternulo min forlasis, kaj mia Sinjoro min forgesis. Ĉu povas virino forgesi sian infaneton kaj ne kompati la idon de sia ventro? Eĉ se ili forgesos, MI VIN NE FORGESOS. Jen sur Miaj manoj Mi vin gravuris; viaj muroj estas ĉiam antaŭ Mi. Rapidis viaj konstruantoj; viaj detruantoj kaj viaj ekstermantoj eliros for de vi. Levu ĉirkaŭen viajn okulojn, kaj rigardu: ĉiuj kolektiĝis, venas al vi. Kiel Mi vivas, diras la Eternulo, vi ĉiujn metos sur vin kiel ornamon, kaj vi ĉirkaŭligos vin per ili kiel fianĉino. Ĉar viaj dezertigitaj kaj senhomigitaj lokoj kaj via ruinigita lando estas tro malvastaj por la loĝantoj, kaj viaj ekstermantoj estos malproksimigitaj. Viaj malaperintaj infanoj ankoraŭ diros en viajn orelojn: Tro malvasta estas por mi la loko; cedu al mi, ke mi povu loĝi. Tiam vi diros en via koro: Kiu naskis al mi ĉi tiujn? mi estis ja seninfana kaj soleca, elpelita kaj forpuŝita; kiu do edukis ilin? mi restis ja sola; kie do estis ĉi tiuj?”* (Jes 49:14-21). ☩

# Esperantistoj en la evangelia eklezio en Togolando

Koffi DOUMEGNON, TG

**E**kde januaro 2006, mi komencis lernigi Esperanton al kelkaj membroj de Evangelia Eklezio kies nomo en la angla estas "Foursquare" en Lome, la ĉefurbo de Togolando.

Mi komencis tiun ĉi instruadon en tre malfacila momento de la Eklezio mem, sed kun la kuraĝigaj vortoj de la Evangelisto kaj kelkaj respondeculoj de la eklezio, ni daŭrigas la e-kurson ĝis nun. Komence nur 5 personoj ĉeestis al la kurso, nun ili estas 19 personoj, kiuj akurate ĉeestas al la duhora kurso ĉiusemajna. Nun la Pastoro, kiu ne konsentis pri la instruado de Esperanto en sia eklezio, ĵus aliĝis al la kurso kaj permesas la starigon de la E-sekcio ene de la eklezio. Ekde la 5-a de septembro 2006, ekzistas E-preĝa grupo, kiu ankaŭ preĝas ĉiudimanĉe antaŭ la komenco de ĉiu kulto. Preskaŭ ĉiuj tiuj 19 personoj serĉas rilati, korespondi evangelicele kun ĉiuj evangeliaj esperantistoj en la mondo, principe kun KELI-anoj.

Dum miaj preĝoj kun ili en Esperanto, ni nur uzas la solan E-Biblion, kiu estis donacita al mi de Pastro Duilio Magnani en 1999 kiam mi estis IKUE-respondeculo en Ebura Bordo. Do nun estas forta bezono de E-Biblio, libretoj pri la Dia parolo, E-novaj Testamentoj, faldfolioj, afiŝoj koncerne la parolon de Dio en Esperanto. Vere la grupo bezonas tion por venigi novajn. La nombro de la eklezianoj de "Foursquare en Be-Kpota"

estas ĉirkaŭ 600 kaj oni ĵus ektradukas la predikadon ankaŭ en Esperanton. Estas nun multaj interesiĝantoj, kiuj certe aliĝos al la grupo. Do ni bezonas vian subtenon materiale (sendo de Biblio, revuoj DIA REGNO e-legolibroj, lernolibroj por bone progresi.) kaj ankaŭ vi povas sendi kuraĝigan leteron al ili eĉ se vi ne volas korespondi kun kelkaj inter ili, kio estas ilia nuna zorgo. Por kontakti la grupon, bonvolu skribi al:

Esperanto-grupo de FOURSQUARE  
c/o AGOUZE Ana  
BP:4915 Lomé-Bè-Kpota  
TOGO  
Tel: (00228) 227 60 25 / 911 69 81  
aimaguze@yahoo.fr aŭ  
koffidoumegnon@hotmail.com

Jen kelkaj membroj, kiuj ĉiam parolas pri korespondado:

- 1) ĈARDEY Kokou, 29 jara lignaĵisto, ŝatas korespondi kun ĉiuj, precipe kun ĉiuj lignaĵistoj kiuj kredas je Jesuo, sed ne gravas se ekzistas alia kategorio de homo, kiu ŝatus korespondi kun li.
- 2) AGOUZE Ana, naskiĝis la 11-an de majo 1981. Ŝi estas komputilisto kaj



nun laboras en privata lernejo. Ŝi estas la sekretario de la E-grupo de FOUR-SQUARE kaj samtempe por la juneca grupo de la eklezio. Lia patro estas la Pastoro de la eklezio. Ŝi emas korespondi pri ĉiuj temoj. Vi povas kontakti ŝin per [aimaguze@yahoo.fr](mailto:aimaguze@yahoo.fr)

- 3) AGOUZE Cristine, juna fratino de Ana. Ŝi estas 23 jara kudristino kaj ŝatas korespondi precipe pri evangeliaj kaj vivaj aferoj.
- 4) AMEWOLO Paŭlin, 38 jara interpretisto de la Eklezio FOUR-SQUARE ŝatas korespondi pri ĉiuj temoj.
- 5) S.ro JOHON, Prezidanto de la e-grupo de FOURSQUARE. Li estas 43 jaraĝa kaj havas tri gefilojn. Li estas motorciklisto kaj ŝatas korespondi kun ĉiuj por la paco en la tuta mondo.
- 6) S.ro Etienne, 37 jara kudristo, kiu ŝatas korespondi kun kudristoj kredantaj je Jesuo en la tuta mondo.
- 7) S.ro Alphonse, 32 jara motorciklisto ŝatas korespondi kun ĉiuj.

## 8) AKAKPO

Patrick, 36 jara bankisto, dua respondeculo de la Eklezio post la Pastoro, deziras korespondi kun homoj por realigi mondonajn projektojn por helpi la membrojn de la eklezio esti sendepende.



Ili ĉiuj uzas la poŝtadreson de la eklezio : BP 4915 Lomé-Togo

La aliaj ankaŭ volas korespondi pri ĉiuj temoj.

Esperante, ke vi multe reagos por subteni tiun ĉi junan grupon, mi deziras ĉion bonan al vi kaj ĝis,

Koffi D.

## Kelkaj faktoj laŭ Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org/wiki/Togolando>)

**Landkodo:** TG.

**E-nomo:** [a] Togo; Togolo; [o] Togolanda Respubliko.

**Nacia nomo:** *République togolaise*.

**Areo:** 56.800 kv.km.

**Politika sistemo:** respubliko.

**Ĉefurbo:** Lomeo (600 000).

**Loĝantaro:** 4 085 000 (1995).

**Ŝtatlingvo:** franca. **Aliaj parolataj lingvoj:** kabiea, evea.

**Eksporto:** fosfatoj, kafo, kakao, kotono.

**Historio:** dum la dua mondmilito ĝi estis okupaciata de Francio kaj Britio. En 1956 Angla Togolando unuiĝis kun Ganao, sed Franca Togolando deklaris sendependecon en 1960.

## Elsbeth Walder-Guggenbühl

**E**lsbeth Walder-Guggenbühl forpasis la 16an de novembro en Uetikon ĉe la lago de Zürich kie ŝi lasttempe loĝis en maljunulejo.

Ŝi estis la kvina kaj lasta filino de vinberkultivistoj en Meilen. En ŝia hejmo ĉiam estis vigla vivo kun multaj personoj kiuj laboris kaj kunvivis en la granda kampara domo. Elsbeth ŝatis kontaktojn, ŝi interesiĝis pri fremdaj lingvoj. Post la lernejo ŝi vojaĝis al la suda parto de Svislando. Ankaŭ en romanda Svislando ŝi renkontis amikojn. En Anglujo ŝi laboris en la domo de altranga militservfunkciulo. Tie ŝi prizorgis kuirejon kaj lernis la anglan lingvon. Post ŝia reveno ŝi lernis la profesion de flegistino en Zürich.

Elsbeth informiĝis pri Esperanto. En perpoŝta kurso ŝi lernis la internacian lingvon. Sinjoro Otto Walder ricevis ŝiajn ekzercojn kaj korektis ilin. Li invitis ŝin al Esperantokunveno en la klublokalto Karl der Grosse en Zürich. Okazis pluraj renkontiĝoj plu kaj ambaŭ korojn trafis la sago de Amor.

En la jaro 1945 la paro geedziĝis. Ŝi sekvis sian edzon al Romanshorn kie Otto ricevis laboron kiel lokomotivestro. Naskiĝis tri filinoj Monika, Ruth kaj Verena. La kvarĉambra loĝejo ĉiam estis malfermita por gastoj el diversaj landoj. Elsbeth ĝuis la kontakton kun interesaj personoj kaj volonte gastigis eksterlandanojn. En la KELI-movado (Kristana Esperantista Ligo Internacia) ŝi trovis siajn plej proksimajn geamikojn. Se eblis ŝi volonte partoprenis la KELI-kongresojn kaj ankaŭ kun sia edzo kelkajn Universalajn Esperantokongresojn vizitis. Al siaj filinoj kaj diversaj junaj geamikoj ŝi instruis la internacian lingvon kaj sciis entuziasmigi ilin.

Post la morto de sia edzo Otto 1988 ŝi forlasis Romanshorn kaj revenis al Meilen al sia propra domo. Ankaŭ tie ŝi volonte gastigis esperantistojn kaj montris al ili la belecojn de Svislando. La aĝo malfaciligis la memstarecon. Kun 82 jaroj ŝi trovis prizorgon en maljunulejo. En la aĝo de 87 jaroj ŝi forlasis tiun ĉi mondon por trovi pacon en la manoj de Dio.

/v.ch-w



### **Gracon deziri**

*Mi ne deziras al vi  
vivon sen malhavo,  
vivon sen doloro,  
vivon sen ĝeno.  
Kion vi devus fari kun tia vivo?  
Sed mi deziras al vi,  
ke vi restu gardata korpe kaj anime.  
Ke iu portas, gardas kaj gvidas vin tra ĉio,  
kio trafas vin, kaj proksimigas vin al via celo.  
Ke vi restu ne tuŝita kun funebro  
kaj kun sorto de aliaj homoj,  
tion mi ne deziras al vi.  
Tiel ne pripensite oni ne deziru.  
Sed mi deziras al vi,  
ke vin ĉiam denove tuŝas io,  
kion mi simple ne povas priskribi.  
Ĝi nomiĝas “Graco”.  
Graco estas malnova vorto,  
sed kiu spertas ĝin,  
por tiu ĝi estas kiel matenlumo.  
Oni ne povas ĝin voli kaj ne devigi,  
sed se ĝi tuŝas vin,  
tiam vi scias: Estas bona.*

*(Martin Böttcher)*